

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten
im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 4

Augusto/Septembro/Oktobro 1972

Minikongreso en Clervaux (Luksemburgio)



Nia ĉarma kongresurbo invitas vin

Antaŭ ni — vere, vi ĝuste legis — staras kongreso, enmeze de bunta aŭtuno en belega pejzaĝo, kun varia, alloga programo, kun multaj kolegoj kaj amikoj el minimume 3 landoj, nome Belgujo, Francujo kaj Germanujo. Minimume el tiuj tri, ĉar ili aranĝos komune siajn jarkunvenojn en la idilia ardena urbeto en norda Luksemburgio.

„Minimume“ ni skribas, ĉar anoncis sin gekolegoj el pluraj landoj, el nordo kaj sudo, kaj pro tio la nomo „minikongreso“.

Kial ĝuste en Luksemburgio kaj ne en unu el la tri aranĝantaj landoj? Nu, ankaŭ tio havas kaŭzon, nome, ĉar en la lando Luksemburgio ekzistas ĝis nun eĉ ne unu fervojista esperantisto, kaj ankaŭ la malmultaj aliaj esperantistoj tie estas preskaŭ ĉiuj freŝbakitaj novuloj. Al ili ni deziras helpi, por ke ili povu plifortigi sian pozicion, por ke la nur antaŭmonatigita Luksemburgia Esperanto-Asocio povu kreski.

Sed ni ligas al tiu „kongreso“ ankaŭ aliajn intencojn. Ni celas krei IFEF-membraron en tiu lando, kaj ni povas certigi al vi, ke multaj bonkoraj helpantoj el Luksemburgio kunpreparas la kongreson. Inter ili estas esperantistoj, sed ankaŭ sufiĉe da neesperantistoj, eĉ tre elstaraj kaj eminentaj. Ni povas aserti, ke ne ofte ni trovis tiom da blipretenco inter homoj ĝis nun tute fremdaj al niaj ideoj. Pro tio ni kuraĝas profeti tre enhavo-riĉajn kaj interesajn tagojn. Por ke ili estu speciale allogaj, la kongreso daŭros du kaj duonan tagojn. La programon vi povas legi en la aliĝilo. El ĝi vi ankaŭ povas ekkoni, ke tiuj, kiuj nur havos tempon ĝis dimanĉo vespere,

havos eblecon, pli frue hejmenvojaĝi. Sed ni vere rekomendas, prenu unu ferian tagon, kion vi ne pentos, aŭ eĉ tie feriu. Venu kaj kunhelpu, por ke la esperantista fervojistaro el duona Eŭropo postlasu fortan impreson en tiu eta lando.

Preskaŭ ĉiuj homoj tie parolas minimume du lingvojn, nome la francan kaj la germanan. Pro tio multaj el ili opinias, ke ili ne bezonas pluan lingvon. Aliaflanke ĝuste pro tiu dulingveco multnombraj luksemburganoj estas lingve tre kapablaj kaj rapide povus eklerni trian lingvon, des pli, ĉar tiu tria, nome Esperanto, enhavas tiom da elementoj el la aliaj du. Ni konvinku ilin!

Ankoraŭ vorto pri Clervaux, urbeto kun ĉirkaŭ 1000 enloĝantoj, haltejo de rapidtrajnoj de la fervoja linio Luksemburgo-Liège, situanta kelkajn kilometrojn antaŭ la belga limo. Pitoreska kastelo el la 12a jarcento tronas alte super la domoj, kaj ĝin la komunumo disponigos por ni kiel kongresejon. Same alte super la urbo situas benediktana abatejo, kaj agrablaj promenadvojoj ĉirkaŭas la romantikan urbeton sur la bordoj de la rivereto Clerve. Kelkaj bonaj hoteloj estos je nia dispono. Se ankaŭ la vetero akordiĝos, certe ĉiu partoprenanto estos kontenta. La stacidomo de Clervaux jam donis permeson, instalaci akceptejon en la stacidomo, kaj en granda salono de la kastelo ni rajtos okazigi ekspozicion, apartan poŝtofacejon, kiu uzos specialan stampilon, kaj vendejon por bildkartoj kaj libroj. Do, vi vidas, vera minikongreso.

Tuj plenigu vian aliĝilon. Venu, vidu, ĝuu!
LKK

GEFA-Jahresversammlung in Clervaux

Das Anmeldeformular mit vorläufigem Programm wurde inzwischen von den Bezirksbeauftragten an die Mitglieder verteilt. Der Wechselkurs für 100 Frlux betrug am 1. 8. 1972 7,43 DM (Angabe der DVKB). Ebenfalls gültiges Zahlungsmittel in Luxemburg ist der belgische Franken mit gleichem Wechselkurs.

Die im Vordruck angegebenen Preise verstehen sich jeweils für 1 Person (bei der Preisangabe für 1 Zimmer mit 2 Betten). Nach

Auskunft der Luxemburgischen Eisenbahnen werden sich die Verkehrszeiten auch nach Einführung des Winterfahrplans nicht wesentlich ändern. Das gemeinsame Mittagessen nach der Rundfahrt (lfd. Nr. 4 der Anmeldung) bezieht sich auf den 9. 10. 1972.

Senden Sie Ihre Anmeldung möglichst bald, spätestens zum 20. 9. 1972 an GEFA — Dienstanschrift: BHS'in Kruse, Sozialamt Frankfurt/Main, AA 517 (Basa: 955/3280).

Esperantista renkontiĝo

La 30-an de septembro kaj la 1-an de oktobro en Plov-

div okazos internacia Esperanto-renkontiĝo. La partoprenantoj havos la eblecon viziti la internacian foiron kaj trarigardi la vidindaĵojn de la urbo.

Por detalaj informoj skribu al: Distrikta Esperantokomitato, p.k. 184, Plovdiv, Bulgario.

Anschriftenänderung

Schriftleiter und Bezirksbeauftragter Wuppertal (bis zur Auflösung der BD Wuppertal) ab sofort neue Anschrift: BAmtm Graß, BD Köln, F 60 (Basa 943/1880)

Distrikt-komisiito en Stuttgart

Mi naskiĝis 1935 en Berlin kaj vivis tie ĝis 1957. Post finita studo en la inĝenierlernejo mi transloĝiĝis al Stuttgart kaj eklaboris ĉe la Germana Federacia Fervojo. Kun Esperanto mi konatiĝis en tiuj jaroj ĉe la studo de libroj el la heredaĵo de mia patro. Plurvoluma verko „La komercisto de hodiaŭ“ el la jaro 1926 enhavis detalan ĉapitron pri Esperanto, ĝia historio kaj gramatiko. En postparolo oni konstatis „ankaŭ precipe la germana komercisto bezonas Esperanton nepre same kiel fremdajn nacilingvojn!“ Kial? „Ĉar ĝi tre faciligas la lernadon de

ĉiuj fremdlingvoj. Due, ĉar ĝi povas utiligi la vastan organizon de la esperantistoj por ilia profesia sukceso kaj trie, ĉar ĝi devas



Siegfried Krüger

esti egalranga al iliaj eksterlandaj konkurantoj, kiuj Esperanton jam multe aplikas.“ Tio estis en 1926! Pli proksime mi ne konatiĝis kun Esperanto antaŭ 1965, la jaro de subskribkolektaĵo por UNESCO. Tiam la distrikto Stuttgart faris samtempe varbekspozicion en la fervoja direkcio. Unu jaron poste mi partoprenis kurson de la distriktkomisiito. La investitan tempon mi neniam pentis. Amikecoj kaj leterŝanĝoj kun esperantistoj estis la abunda rekompenco. Post la foriro de nia longjara distriktkomisiito Kiefer al ZVL Frankfurt/Main nun mi prizorgas kiel posteulo la kolegojn en la distrikto Stuttgart.

Aŭto kaj lokomotivo samtempe

Plurjara esplorprogramo sukcese finiĝis per oficiala agnosko flanke de la Germana Federacia Fervojo (DB) por du aŭtotipoj kiel trak/ŝoseaj veturiloj: Unimog kaj Ford Transit. Kun la samaj pneŭmatikoj ili povas veturi kaj sur trako kaj sur ŝoseo. Por surtraka moviĝo la stirilo estas blokata en meza pozicio kaj la gvidan rolon de radflaŝoj transprenas kvar ŝpurteniloj, kiuj glitas respektive rulglitas laŭlonge de la relkapa internflanko tuj malantaŭ la radoj. Tiu du-media mekanismo estas pneŭmate levebla por ŝosea veturado, por surtraka uzo ĝi malleviĝas per propra pezo kaj estas riglata en malsupra pozicio. La medioŝanĝo daŭras ne pli longe ol 1 minuton. Se surtraka uzo estas pliofta ol surŝosea oni povas munti specialajn porttrakajn pneŭmatikojn. La rapideco surtraka estas limigita al 70 km/h. La uzeblecoj por ĉi tiuj veturiloj estas multflankaj.

Sur privataj aliĝtrakoj ili povas treni kaj manovri vagonojn (ĝis 300 t la Unimog kun speciala vagonbremso povas trakcii), en la fervoja servo ili povas funkcii kiel motordrezinoj aŭ inspektveturiloj. La Svisaj Federaciaj Fervojoj (SBB) jam ricevis 40 tiajn veturilojn, la Svedaj Statfervojoj (SJ) planas la ekuzon de 250 ekzempleroj. Ĉe la Germana Federacia Fervojo (DB) nun funkcias 10 dumediaj veturiloj, unu el ili jam rulis 20 000 km sur reloj. Kelkaj provaj veturiloj troviĝas en suda ameriko kaj Irano.

Esperanto in der Praxis

Eindhoven. Die Firma Philips, Abteilung Medical Systems Division, brachte soeben einen Prospekt in Esperanto heraus mit dem Titel „Modernaj tendencoj kaj evoluoj en medicinaj sistemoj por Radio-Diagnozo, Redio-Terapio, Nuklea Medicino, Medicina Elektroniko“.

Mailand-Barcelona. Die internationalen Messen von Mailand und Barcelona 1972 haben Plakate auch in der internationalen Sprache Esperanto herausgebracht.

Staatspräsident Tito Schirmherr des 58. UEA-Kongresses

Josip Broz Tito, der Präsident Jugoslawiens, dessen 80. Geburtstag in diesem Jahr in Jugoslawien festlich begangen wird, hat die Schirmherrschaft über den 58. Kongreß des universalen Esperanto-Bundes (UEA) übernommen. Der Kongreß findet 1973 in Belgrad statt.

Es ist dies das zweite Mal in der Esperanto-Geschichte, daß ein Staatsoberhaupt und aktiver Esperantist die Schirmherrschaft eines Weltkongresses übernimmt. Erstmals geschah dies beim 55. UEA-Kongreß in Wien durch Bundespräsident Dr. Franz Jonas.

Die Nachricht dieses bedeutenden Ereignisses wurde durch das jugoslawische Fernsehen verbreitet.

Aus den Gruppen

Wuppertal

Vom 9.—17. 6. 1972 zeigte der Bezirksvorstand des BSW im Rahmen einer Wanderausstellung Tätigkeiten der freizeitschaffenden kulturellen Gruppen. Im großen Sitzungssaal des BD-Gebäudes wurde die Ausstellung am 9. 6. feierlich eröffnet. Es wirkten mit ein kleiner Chor, eine Musikgruppe und die Schauspielgruppe. Das GEFA-Ausstellungsstück mit ca. 7,5 m Länge fand rege Beachtung. Die Ausstellung wurde von Mitgliedern der Esperanto-Gruppen Hagen und Schwelm betreut. „Esperanto auf einem Blatt“ wurde von den Interessenten gerne entgegengenommen. Zu einem späteren Zeitpunkt soll das gesamte Material nochmals in Hagen und Siegen vorgeführt werden.

Eurailpass

estas tipo de fervojbileto vendota en Ameriko, Aŭstralio, Suda Afriko kaj en multaj landoj en Azio al personoj, kiuj loĝas en la menciitaj kontinentoj. Ĝi validas por nelimigita nombro da vojaĝoj en unua- kaj dua-klasaj trajnoj en 13 landoj en Okcidenta Eŭropo. La biletoj estas eldonataj kun valideco de alternative 21 tagoj, 1, 2 aŭ 3 monatoj, kaj la prezoj estas respektive 125, 160, 210 kaj 250 usonaj dolaroj. Troviĝas ankaŭ simila bileto nur por studentoj, nome la tielnomata »STUDENT RAIL-PASS«, ĝi validas en du monatoj kaj nur por 2-a-



BSW-Ausstellung — Esperanto-Stand

klasaj vagonoj. La prezo estas 130 usonaj dolaroj.

Ambaŭ tipoj de biletoj estas tre popularaj kaj la nombro da venditaj biletoj konstante kreskas.

— Kial ne libertempi en Madagaskaro? — Se vin interesas la afero, informiĝu ĉe la organizanto: »Konoj pri Madagaskaro«, B. P. 1678, T a n a n a r i v o , Malgaŝa Respubliko.

Lehrbücher in Esperanto-Kurzschrift

Das Städtische RUHRTAL-MUSEUM — Abteilung Stenografie — in Schwerte (Ruhr) bittet um leihweise (oder endgültige) Überlassung dieser Lehrbücher oder -hefte gegen Anerkennungsschreiben.

Antwort erbittet: Ernst Kniephoff, 5840 Schwerte (Ruhr), Poststraße 11.

— Skoto edziĝis kaj vojaĝis kun sia novedzino dum mielmonato. En Edinburg Ĥi aĉetis bonbonskatolon al sia edzino. En London Ĥi donis al ŝi la unuan bonbonon el la skatolo. En Paris la duan, en Berlin la trian, en Wien la kvaran. Kiam ili estis en Roma, ŝi volis ankoraŭ bonbonon. Sed la Skoto diris: »Mia kara, vi jam sufiĉe frandis. La reston ni lasos por infanoj.«

el: raitis raŭtatieläinen nr 3/72

Budapest. Der Fremdenverkehrs-Informationsdienst in Budapest versendet auf Anforderung Prospekte in Esperanto über Veranstaltungen des Jahres 1972. Besonders weist der Informationsdienst auf das Ungarische Kultur-Festival in Budapest hin, das im Juli vom Ungarischen Esperanto-Bund veranstaltet wurde.

Pilo

Redaktfino por n-ro 5 estas la 10an de novembro 1972.